

gazeto por komencantaj esperantistoj kaj komencantaj aŭtozoj

## redakcie

Karaj legantoj!

Dum 6 senajnoj, kiuj pasis ekde la antaŭa numero okazis jeno:

Ni ricevis multajn pozitivajn reeĥojn pri la enhavo kaj aspekto de la 1-a numero, dankon!

En la listo de perantoj aperis du novaj adresoj - Ĝ nun havas oficialajn kaj seriozajn perantojn en 6 landoj. Al *Estonio*, *Svedio*, *Svislando* kaj *Ukrainio* aldoniĝis *Pollando* kaj *Italio*.

Bonaj homoj daŭre faras donacojn.

Homoj seriozaj donas konsilojn kaj rimarkojn.

Por la enhavo laboris novaj kaj malnovaj komencantaj aŭtoroj. En ĉi-numero ni malkovras plene talenton de komencanta aŭtoro-poeto el *Nabereĥnije Ĉelni*, (Tatarstan) — NEKONATULO.

Kuraĝa estas provo de Aleksandr Nasonov, 12-jara lernanto, kiu ellernis dume nur duonon de elementa kurso de Esperanto.

Ni daŭrigas nian serion pri la esperantista gazeto per rakonto pri la revuo ESPERANTO kaj ĵetas rigardon al la periodo inter du mondmilitoj.

Rubriko **KORESPONDUI** prezentas novajn adresojn. Dank'al tiu rubriko jam kelkaj personoj trovis leteramikojn — sukcesojn!

\*\*\*\*\*

## Estu seriozaj por ne ŝajni kuriozaj

*redaktoraj respondoj al kelkaj demandoj de la legantoj*

**K**iam mi estis juna unuajara Esperantisto mi ofte kun fervoro defendis la avantaĝojn de nia kara lingvo antaŭ ĝiaj kontraŭuloj kaj neesperantistoj. Min incitis moko kaj ŝercoj de miaj kolegoj, kiam ili imitis esperantan prononcon aldonante finaĵon "o" al la ruslingvaj substantivoj kvazaŭparolis esperante, aludante al ĝia primitiveco.

Pasis pli ol dudek jaroj. Centoj da artikoloj en loka kaj centra gazetaro aperis el sub mia plumo. Centoj da korespondaj kursanoj finis ĉe mi elementan kurson. Por ili antaŭ kelkaj jaroj mi faris "KOMENCANTO"-n, kiu nun denove ekfunkciis. Mi konstatas, ke malgraŭ ekonomiaj malfacilaĵoj en nia lando intereso al Esperanto restas sufiĉe alta.

Antaŭ dudek jaroj miaj rivaloj argumentis, ke jen, pasos nur 5-10 jaroj kaj la angla lingvo plene regos en la mondo kaj *via* Esperanto restos historia kuriozaĵo. Kion ni vidas hodiaŭ? Mi povas konstati, ke malgraŭ apero de multaj teknikaj rimedoj por tradukado, malgraŭ komputila invado al ĉiuj flankoj de la vivo procento de flue angleparolantaj personoj restis la sama kiel antaŭ 20 jaroj. Same multaj penas lerni ĝin kun la sama preskaŭ nula rezulto. Se mi ne pravus, kial do oni rusigis ĉiujn komputilajn programojn?

Do, mi rajtas konkludi, ke pozicioj de la angla kiel internacia ne tro kreskis. Kaj apenaŭ en Japanio, Brazilo, Francio aŭ Rusio oni povas trovi unu personon el mil loĝantoj, kiu sencerbume rapide respondos la demandon "What time is it now?" (Kioma horo estas nun?) en la angla.

Esperanto pruvis sian vivecon kaj realan utilon por multaj siaj adeptoj. Esperantistoj ne atendas kiam E-to fin-fine iĝos agnoskita kiel sola internacia lingvo, sed uzas ĝin en sia interna komunumo. Kaj faras tion plezure, donante brilan ekzemplon por ĉiuj dubantoj.

Uzo de Esperanto en Interreto pruvas ĝian plenan taŭgon kaj espereble eĉ praktikan solvon de interkompreno de la tutmonda Interreta sistemo. Jam hodiaŭ centoj da esperantistaj organizaĵoj kaj institucioj havas siajn hejmpaĝojn. Oni kalkulis, nur pri D-ro Zamenfoĥ troviĝas pli ol 600 mencioj!

Plejparto de Ruslandaj abonantoj de Ĝ kaj korespondaj kursanoj dume ne kontaktas Interreton. Sed jam kelkaj personoj el miaj lernantoj kuraĝas partopreni UEA-kongreson en Monpeliero. Multaj el ili ek de la unuaj lecionoj komencas praktike apliki Esperanton per korespondado letera. Kaj mi miavice donas al ili unikan eblon malkovri siajn talentojn sur paĝoj de nia gazeto.

Ĉiujare okazas pli ol cent kongresoj kaj renkontiĝoj internaciaj. Dekoj da ĵurnaloj, kelkaj kun preskaŭ centjara historio. Miloj da librotitoloj. Kaj certe praktikaj personaj internaciaj kontaktoj, kio estas evidente la ĉefa celo de ĉiu aktiva esperantisto — homaj kontaktoj tra la tuta mondo!

Por oni ne traktu vin kiel iuj stranguloj, mi invitas vin esti seriozaj rilate al Esperanto. Se vi serioze rilatas al la afero — vin oni nepre estimos. Kaj pere de vi la aferon mem.

*via Viktor Kudrjavcev*

**KOMENCARTO**

1998 numero 2  
fondita en 1992  
8 numeroj jare  
redaktas kaj eldonas:  
Viktor Kudrjavcev  
konstanta kunlaboranto:  
Rafija Jafasova  
adreso: 620041, Ekaterin-  
burg, ab. ja. 132, Ruslando  
abontarifo por 1998:  
internacia tarifo:  
24 nederlandaj guldenoj aŭ  
12 usonaj dolaroj  
orienteŭropa kaj latiname-  
rikā tarifo:  
10 usonaj dolaroj  
konto ĉe UEA: **vkud-a**  
ruslanda tarifo:  
32 (000) рублей (за 8 но-  
меров в год) простым  
почтовым переводом на  
имя Кудрявцева Викто-  
ра Васильевича: 620041,  
Екатеринбург, аб. ящ.  
132

**PERANTOJ de****KOMENCARTO**

laŭ ĉi-subaj adresoj vi po-  
vas aboni nian gazeton

**ESTONIO**

Virve Ernits, Mahla 65 — 1,  
EE — 0012, Tallinn

**ITALIO**

Višnja Brankovič, Via  
Leghissa 6, IT-34131 Trieste

**POLLANDO**

Maciej Wnuk, Skrytka 105,  
ul. Broniewskiego 77-137,  
PL-01-865 Warszawa

**SVEDIO**

SEF, Lisbet Andréasson,  
Södra Rörum pl 455, SE —  
24294 Hörby

**SVISLANDO**

Christoph Scheidegger, Im  
Schleedorn 6, CH — 4224  
Nenzlingen

**UKRAINIO**

Dmitrij Cibulevskij, ab.skr.  
9307, UA — 310003, Ĥarkiv

Historiaj studoj de Z

**Intez du mondmilitoj**

“Rimarkinda florado” sur la ter-  
eno de la esperanta gazetaro estis  
haltigita pro la Unua mondmilito  
kaj ĝiaj postsekvoj.

Tamen iom post iom la situacio  
en la mondo normaligis kaj la espe-  
rantista movado denove vigligis.  
Daŭre funkciis kelkaj malnovaj  
periodaĵoj kaj aperis grandega  
kvanto da novaj gazetoj kaj  
ĵurnaloj.

En la periodo inter du mondmili-  
toj, pli ĝuste ĝis la 37-a jaro, kiam  
stalina kaj hitlera reĝimoj perseku-  
tis adeptojn de la internacia lingvo,  
laŭ la statistiko de “Bibliografio de  
Internacia Lingvo” ĝis 1929 aperis  
985 periodaĵoj, el kiuj nur 715  
havis numersinsekvon. Laŭ la  
“Katalogo de Esperanto-gazetaro”  
ĝis 1934 estis 1276 periodaĵoj en  
459 urboj de 59 landoj. Estas in-  
terese, ke el ili 45 aperis nur  
unufoje, 448 — de 2 ĝis 8 fojojn,  
167 havis jarkolekton, 330 —  
funkciadis de 2 ĝis 5 jaroj, 152 —  
pli ol 5 jaroj.

El tio sekvas, ke entuziasmo en  
la dudekaj-tridekaj jaroj ĉirkaŭ Es-  
peranto estis tre alta. Sed samtempe  
evidentiĝis, ke eldoni regulan  
gazeton aŭ ĵurnalon estas vere  
malfacila afero, kie nura entuzi-  
asmo ne sufiĉas. Bezonatas  
pagipovaj abonantoj. Kaj nur kelkaj  
el tiutempaj periodaĵoj, dank’al sin-  
donema laboro de iliaj redaktoroj,  
vivis longe kaj havis tiam grandan  
eldonkvanton, ekzemple la revuo  
ESPERANTO. (Vidu la artikolon  
sur la najbara paĝo)

Ĉi tie ni mencias nur kelkajn el  
tiuj centoj por konatigi vin kun la  
nomoj, direktoj kaj la ekzistojaroj.

*La klasbatalaj:* Sennaciulo - 1924  
organo de SAT (Sennacieca Asocio  
Tutmonda) kaj Sennacieca revuo  
(ambaŭ de E.Lanti) - 1921. La nova  
Epoko - 1922.

LnE kuniĝis en 1929 ĝis 1933 kun  
SR sub la nomo de la dua el ili, kaj  
poste denove Sennacieca revuo  
apartiĝis. Ankaŭ klasbatala Inter-  
naciisto - 1930.

El la movadaj revuoj: en Francio  
La Movado (1910-14; 1923-33), en  
Anglio The British Esperantist —  
La Brita Esperantisto (1903 - ĝis  
hodiaŭ), New Zealand Esperantist -  
1929 kaj The Australian Espe-  
rantist - 1940. Norvega Esperanti-  
sto - 1932, multaj aliaj revuoj kaj  
bultenoj de Landaj Asocioj. Espe-  
rantista Junularo - 1920.

*Politikaj:* Sur Posteno - 1933, La  
kritika observanto - 1934.

El la kulturaj: Marto (1922-33) -  
originalaj kontribuoj. Literatura -  
en Anglio 1915-25, Literatura  
mondo — famega revuo redaktata de  
J.Baghy kaj K.Kalocsay (1922-26,  
1931-38). La Ondo de Dapĝava -  
literatura, 1925-31. Oomoto - (1925  
- ĝis nun), religia, sed kun kultura  
signifo.

Iel aparte staras “La Praktiko —  
gazeto kiu instruas kaj amuzas”. Ĝi  
estis vere lerta, utila kaj distra legaĵo,  
kiu aperis ĝis 1970.

Aperadis ankaŭ teknikaj periodaĵoj:  
Internacia scienca revuo - 1922. In-  
ternacia medicina revuo - (1923-25;  
1926-36). Internacia pedagogia re-  
vuo - (1927-39) ja.

Kaj certe periodaĵoj religiaj: La  
Ora Epoko, La Nova Tago - 1925,  
gazeto de Bahaa religio, daŭre  
frekvencis Espero Katolika, kiu  
bone fartas ĝis hodiaŭ..

**DANKON!** Al la s-ro *Lothar  
Mahn*, (Rottweil, Germanio), pro la  
donaco por Z 20 guldenoj.

La sekva numero de  
**KOMENCARTO** aperos la  
15-an de aprilo 1998

# ESPERANTO

Ĉefa gazeto de la Esperanto-movado, oficiala organo (monata) de UEA. — Fondis la gazeton franca esperantisto *Paul Berthelot* (1882-1910) en junio 1905 sub la nomo *Esperanto-journal*. Post dujara baraktado li transdonis ĝin en 1907 al *Hector Hodler*, (1887-1920), tiam ankoraŭ 19-a jara, ĵus fininta la gimnazion, filo de fama pentristo Ferdinand Hodler. Li estis posedinto kaj redaktoro de la gazeto ĝis 1920.

Tiam kaj ĝis 1910 ĝi aperis en 48x34 cm-a formato, en 1909 eĉ 60 cm alta 44 cm larĝa, paĝonombro 4-6. Ekde 1911 la formato fariĝis 32x23. Ĝis 1914 la gazeto aperis dufoje monate kun preskaŭ matematika reguleco. La enhavo estis lertā miksaĵo de tagaj kaj esperantistaj okazintaĵoj. Jam en la unuaj numeroj montriĝas la talento de Hodler turni la atenton al praktikaj aferoj. Li tendence atentis sociajn problemojn kaj ĉiam revenis al la ĉefa ideo: harmonia kunlaboro de ĉiuj popoloj pere de Esperanto. En 1908 fondiĝis UEA, konkreta solvo de tiu ĉi ideo. La evoluon tranĉis la milito.

Post kelkmonata interrompo tamen reaperis la revuo en 1915. En artikoloj ankoraŭ nun legindaj la redaktoro montris la kaŭzojn de la tutmonda katastrofo, laŭgrade evoluigante la ĉefajn ideojn pri la intergenta malordo. Hodler mortis en aprilo de 1920, la revuon heredis UEA kune kun sumo por kovri eblan deficiton. Nova redaktoro fariĝis *Edmond Privat*, franclingva sviso, d-ro pri historio, docento ĉe la Ĝeneva Universitato kiu 16-jara partoprenis la Unuan kongreson en *Boulogne sur Mer*, li fidele sekvis la tradicion de la revuo kaj klopodis igi ĝin tribuno de plej noblaj ideoj.

Periodaĵo, kiu servis por movado kun nepolitika karaktero, por movado lingva, internacia, kaj kies legantaro grupiĝas en ĉiuj klasoj sociaj, havas certan malfacilecon. Aŭ ĝi fariĝos senkolora, oficiala komunikilo plej teda, aŭ ĝi estos amuziga kafotabla legaĵo

kun rakontetoj infanecaj. Multaj temoj estas neeblaj por ĝi, aliaj postulas atenton, dekstre kaj maldekstre, dume restas ankoraŭ la plia malhelpo, ke la legantaro ne estas unuforma.

Nombro de la presitaj ekzempleroj en 1913 estis 66.000; en 1920 - 35.000; en 1930 - 75.000 en 1932 - 72.000. Paĝonombro en 1913 - 382., en 1920 - 244; en 1925 - 234; en 1930 - 210, en 1932 - 200.

La teknikan aranĝon kaj parte la redaktan laboron prizorgas la direktoro de UEA, *H. Jakob*, la recenzadon de l'libroj plenumas de 1920 *G. Stroele*. Kun la revuo ĉiam kunlaboris aro da bonaj verkistoj.

La gazeto modele sekvas la Zamenhofan lingvouzadon ĝis la hodiaŭaj tagoj. En ĝi aperas la plej gravaj alvokoj, sciigoj pri la esperantistaj novaĵoj el la tuta mondo. Ĝi enhavas ankaŭ literaturan paĝon.

Hodiaŭ la revuon oni legas en pli ol 115 landoj de la mondo. Konstantaj rubrikoj: ĝeneralaĵoj, administrado, financo, periodaĵoj kaj serioj, kongresoj kaj turismo, informado, eksteraj rilatoj, landa kaj regiona agado, junulara sekcio, kulturo, instruado, faka agado kaj scienca aplikado, esploro kaj dokumentado, esperanto en radio kaj aliaj. Ĝi havas 24 paĝojn, kolorajn kovrilojn, altkvalitan kaj imponan aspekton, aperas ĉiumonate escepte de aŭgusto.

Hodiaŭ ESPERANTO — oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, sub la redaktoro *Istvan Ertl*, forte tenas la standardon de la plej grava periodaĵa organo de la esperantista movado.

**Abonkondiĉoj : 27\$ petu informojn ĉe  
via landa asocio aŭ via landa peranto  
por Ruslando: 620014, ab.ja. 162,  
Gorecka Halina Romanovna, 110 rubloj.**

# AKUZATIVO

Unu el la plej malfacilaj problemoj en E-gramatiko estas akuzativo. En diversaj lernolibroj oni uzas diversajn metodojn, ofte prezentas regulojn pri la akuzativo kaj finaĵo "n" en apartaj ĉapitroj kaj lecionoj. Ĉi-sube ni provis kunigi regulojn pri akuzativo kaj finaĵo "n" sur unu paĝo tiel, ke estus oportune konsulti la tutan regularon momente.

## Oni devas NEPRE UZI

### akuzativon:

1. Post la transitivaj verboj:

*Mi ricevis interesan leteron.*

2. Por esprimi direkton de ago aŭ movo:

(post la prepozicioj *en, sur, sub...*)

*Mi iras en arbaron*

3. Adverboj ankaŭ havas akuzativon de direkto:

*Kien vi iras? Mi iras hejmen*

4. Por esprimi:

a) DAŬRON DE TEMPO:

*Mi dormis la tutan nokton*

b) DATON:

*La unuan de januaro venas Nova Jaro*

c) KOSTON:

*La bileto kostas tri rublojn*

ĉ) MEZURON:

*Li estas du metrojn alta*

d) KVANTON:

*La briko pezas tri kilogramojn*

5. En frazoj, kie estas forlasita verbo:

*Saluton = Mi sendas al vi saluton!*

*Bonan tagon! = Mi deziras al vi bonan tagon!*

## oni NE UZAS akuzativon:

1. Post la verbo *estas*

2. Post la prepozicioj:

*al, ĝis, de, el, da, pri, pro, por, per, kun, sen, dum, laŭ, malgraŭ, ĉe, tra, preter, je.*

## TRANSITIVAJ VERBOJ

Transitiva verbo estas tia, ke ĝi esprimas agon, kiu pasas de subjekto al objekto (PIV)

aboni	eduki	kisi	perdi
aĉeti	elekti	komenci	peti
admiri	eviti	kompari	porti
agnoski,	fari	koni	povi
agordi	fermi	kopii	preni
akcepti,	fini	korekti	promesi
akiri	kisi	kosti	ricevi
akuzi	komenci	kredi	saluti
ami	kompari	kuri	sendi
amuzi	koni	lavi	senti
atendi	kopii	legi	skribi
aŭdi	gajni	levi	studi
bani	gvidi	ligi	tiŝi
bati	haki	mangĝi	toleri
bezoni	havi	memori	tranĉi
citi	helpi	mendi	trinki
danki	inviti	meti	uzi
decidi	ĵeti	montri	verki
defendi	kalkuli	movi	verŝi
diri	kanti	pagi	vidi
doni	kapti	pardoni	voli
donaci	kaŝi	paroli	

## **ATENTON!**

En Esperanto ekzistas grupo de verboj, kiuj samtempe povas esti transitivaj kaj *netransitivaj*

adiaŭi, aplaŭdi, danki, helpi, kredi, pardoni, paroli, respondi, servi, simili, atenti, dubi, esperi, forgesi, memori, peti, zorgi, partopreni k.a.

En la unua numero de K debutis talenta komencanta aŭtoro el Nabereĝnije Ĉelni, (Tatarstan) sub pseŭdonimo NEKONATULO. Nepre legu, mi kredas, ke tiuj fajnaj versoj tuŝos sincere vian animon!

## LERNANTINO

Sidas vi apud la lernotablo,  
Pri adverboj tabelon strekas,  
Iufoje, de tempo al tempo,  
Supran lipon malrapide lekas,

Via blanka, elvoka bluzeto,  
Strikte tegas bonforman mamon,  
Eleganta, gracia sinteno,  
Tre similas al monta ĉamo,

Leda, nigra, mallonga jupeto,  
Preskaŭ belfemuroj ŝirmiĝas,  
Brunkoloraj, enigmaj okuloj,  
Ebriige min, altiriĝas,

Mi forgesis pri la leciono,  
Kret' rompiĝas en mia mano,  
Ĉiuj vortoj ŝtopiĝas en gorĝo,  
En la koro ekbrulas amflamo,

Vi ne scias pri mia konsterno,  
Kun ridet' ĉerizlipoj feliĉas,  
En tumulto per raŭka voĉo,  
Diras mi — "Por hodiaŭ sufuĉas

## EN LA ĈAMBRO DISVERŝIĜAS LUMO

En la ĉambro disverŝiĝas lumo,  
Per ringetoj naĝas for kandela fumo,  
En la kapo aromatas frambovino,  
En la lito min brakumas amatino,

Ŝi karesas mon pasie kaj kuraĝe,  
Ĝemas dolĉe en silento, kisas braĝe,  
Langopinto ŝia tiklas nian ĉicon,  
longaj fingroj ion palpas senmalice,

En la glaso ruĝe brilas amtrinkaĵo,  
Longmemoros mi kvinhoran agrablaĵon,  
Eltrinkante ĝis la fundo frambovinon,  
Mi salutas puran amon kaj virinon.

N

E

K

O

N

A

T

H

L

O

VARSOVIO,

AŬGUST',

KONATIĜO...

Varsovio, aŭgust', konatiĝo,  
Alilanda partoprenantino,  
Kunpuŝiĝis ni per okuloj,  
Gajrideto, petola kapklino,

Sanĝiĝis tagoj, kuradis la tempo,  
Ni rapide kunamikiĝis,  
Niaj sentoj de nokto al nokto,  
Vekis tenton kaj kunproksimiĝis,

Ĉio miksiĝis en lasta dimanĉo,  
Ekrigardoj, tenera doloro,  
Korkonfes', intergamba virlanĉo,  
Oftspirado, agrabla langvoro,

Tiu ŝtorma vivkalejdoskopio,  
En la fino de la semajno,  
Instruadis min al "ama lopo",  
Al sincer', al la anima fajno,

Sed en lundo ŝi sidis en buso,  
Longe svingis per karesaj manoj,  
Kurte ĵetis — "Adiaŭ, ruso,  
Kaj saluton al viaj klubanoj.

En la redakcia teko kuŝas ankoraŭ multaj bonaj poemoj de NEKONATULO.

Ni volas scii vian opinion pri poezio de N. Reehu!

Ni proponis al niaj gekursanoj plenumi amuzan taskon — verki sencohavan rakont(et)on, en kiu ĉiuj vortoj komenciĝus je la sama litero. Kiel ekzemplo la redakcio proponis la sekvan tekston:

**M**elodias muziko. Magazena mastro Migelo malice marĉandas. Mono mankas, monujo malplenas! Malsupre multaj malgrandaj musaj makzeloj meditante maĉas maturan maizon. Moviĝas minutoj. Maiza monto malgrandiĝas. Marŝas magazena mastro. Musoj momente moviĝas muran malsupron. Mirigita mastro mem mezuras maizon — maizo minusiĝis multfoje! Mastro Migelo meditas. Mirinde!..

La redakcio ricevis vere originalajn provojn de personoj, kiuj lernas en la elementa kurso koresponde. Vere ni estas pravaj — inter komencantoj multas talentaj personoj! SEZONOJ, STULTA SULTANO kaj FORE apartenas al la plumo de *Leksina Ludmila*, (307800, RUSIO, Kurskaja obl., SUDĴA, Gonĉarovka, Lugovaja, 2a)

## SEZONOJ

### PRINTEMPO

Naturo noviĝas! **n**  
Narcisoj naskiĝas,  
Neĝblankaj nubetoj  
Nodligas nimbetojn.

### SOMERO

Noktomezo. Najtingaloj...  
Nun nirvane nur najbaro  
Nia nombras nuptfloraron.

### AŬTUNO


Najtingaloj neniĝis,  
Nuksarbaro nun nudiĝis,  
Naĝas nigraj nubegoj,  
Nostalgio nardega.

### VINTRO

Novjaro!  
Neĝo!  
Neĝventego,  
Neĝeroj najlas novalegon.


## STULTA SULTANO

Somera suno.  
Sendenenda  
Sidanta supre  
Subpremanta  
Subtila  
Suda  
Suferanta  
Sultano sufokis  
Sunbrilon  
Sed superruzas suno supre  
Sabotis suverenon:  
Sultano stulta sangas svene.



## FORE

Forgesi foje fridan,  
Fieran flavan floron?  
Fatale falas fido,  
Feliĉo fuĝas fore.




## O C E A N O

**O**

*Nasonov Aleksandr*, 12 jaroj, lernas koresponde ĉe Viktor Kudrjavcev. (399450, RUSIO, Lipeckaja obl., Dobrinskij r-n., Ĉ-Nikolskoje, ul. Dubrovka)

Orsuno originale ornamas oktobrajn ombrojn. Olda orfa orko ofte okule observas oceanan ordon orienten-okcidenten. Obtuzaj oceanaj ondoj obstine ofensivas. Oksigeno odoras ozone.



*Birjukova Olga*, (636070 Tomskaja ob., Seversk-7, Lesnaja 11a-80)

- Edzino, kioma horo estas?
- Hieraŭ vespere en tiu horo estis la oka.

\*\*\*

*Volkov Aleksandr*, (452280, RUSIO, Baŝkirio, Aurgazinskij r-n, TOLBAZI, ul. Matrosova, 44/19)

- Dio! Kion por vi signifas cent mil jaroj?
- Unu minuton.
- Sed cent mil rubloj?
- Kopekon.
- Donacu al mi unu kopekon!
- Atendu minuton...

## ENIGMOJ *Hajdarova Violetta*,

(Baŝkirio, 453640, SIBAJ, Sverdlova, 55/1-33, )

1. Kio ne estas sed havas nomon?
2. Ilin havas katoj kaj nur katoj.
3. Kie estas urboj sen domoj kaj akvejoj sen akvo?
4. Kiel skribi kvinmil sescent kvardek du per unu vorto?

## Leter kesto

La redakcio daŭre ricevas leterojn de la legantoj kaj aliaj bonaj homoj. Dankon al vi, karaj niaj "komencantoj" Ne estu pigraj, skribu kaj kontribuu por KOMENCANTO!



"...mi deziras diri al vi amike kaj sincere ke mi iom cerbumis ĉu akcepti perantecon. Nome, vi ludas per tre danĝera fajro: la gazeton por komencantoj faras la komencantoj, kio estas principe danĝera. Nome, ĝuste komencantoj bezonas ekzemplan, modelan lingvon kiu ĝuste instruu ilin. Mi estas via "esperanta samaĝulo", sed mi ne kuraĝas entrepreni ion similan. Tamen, mi rimarkis, ke vi sufiĉe "bone naĝas" en tiu akvo. Daŭre elkore mi konsilas al vi esti tre atenta, trovi pliajn kunlaborantojn, laŭeble diverslingvanojn, kiuj krom vi kontrolas la lingvaĵon.

(*Vjaŝnja Brankoviĉ*, Via Leghissa, 6 34131 Trieste, ITALIO)



Dankon pro la provnumero de KOMENCANTO. Bonega iniciato! Bona enhavo, sed vi certigu ke ne estu lingvaj eraroj. Salutas vin!

(*Douglas Draper*, redaktoro de "Norvega Esperantisto", Olaf Schous vei 18, NO — 0572 Oslo, NORVEGIO)



Antaŭ sufiĉe longe ... mi ricevis la gazeton KOMENCANTO kaj mi ĝojas, ke tiu gazeto denove viglas. Estas mia intenco re-aboni la gazeton. Sukcesojn al vi!

(*Burt Titus*, 33 No. Linden Drive, Ventura, Ca. 93004, USA)



Estimata samideano Viktor Vasilejeviĉ! Mi dankas vin ege pro la sendo de rĕnaskiĝita KOMENCANTO — fortimpresa kaj admirega afero. Mi transsendis modestan sumon al via UEA-konto vkud-a kiel la prezado de via E-o-gazetlaboro. Salutojn kaj bondezirojn!

(*LotharNahn*, Kastanienst. 14. DE-78628, Rottweil, GERMANIO)

## RADIO AŬSTRIA INTERNACIA

Ĉi-sube ni metas la horaron de aŭstria radio en esperanto kaj ilian mesaĝon kaj petas ĉiujn abonantojn de KOMENCANTO skribi al Aŭstria Radio kaj peti de ili programon de radioelsendoj, kiun ili sendos al vi senpage!

### Ameriko (UTC)

00.05-00.30 — 7325kHz/41m; 9870kHz/31m

### Eŭropo (UTC)

04.05-04.30 — 6155kHz/49m; 13730kHz/22m

15.05-15.30 — 6155kHz/49m; 13730kHz/22m

Ni estas en la mondo la voĉo de Aŭstrio. Ni disaŭdigas laŭ la komisiono de federacia registaro kaj je kostoj de la federacio. Nia redakta sendependeco estas leĝe garantiita. Semajna komentario, raportoj, felietonoj, leterkesto.

UTC — Universal Time Coordinated=Universala Tempo (Londono). CET — Centra Eŭropa Tempo. CET=UTC+1horo

# KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 3 rublojn aŭ 2 Internaciajn Respondkuponojn  
Por pagintaj abonantoj de "x" - senpage

*Japana Esperanto-Koresponda-Servo*  
konstante akceptas korespondajn proponojn kun japanoj. Skribu unuope al:  
KLEG, Sonehigasi,  
1-11-46-204, Toyonakasi 561. JAPANIO

*Nikitina Oksana*  
28j., pm, kino, libroj, muziko  
ab.ja. 171,  
KIEV,  
252164,  
UKRAINIO

*Nekrasov Artjom*  
14j., pasaĝeraj aviadiloj, fremdaj lingvoj  
Oktjabrskij pr., 176-6,  
SIKTIVKAR  
Komia respubliko  
167005  
RUSLANDO

*Kiselova Olga*  
28j., libroj, lingvoj  
Panfilova, 21-49,  
JAROSLAVL,  
150034  
RUSLANDO

*Janalieva Zuhra*  
22j., sporto, libroj  
Agregatnaja 16,  
Ĵelaeva,  
URALSK,  
417018,  
KAZAHIO

*AMIKECA RETO*  
servo de Sennacieca Asocio Tutmonda nun posedas rektan ret-adreson, kien vi povas sendi aligilojn aŭ informpetojn  
<a.reto@france-association.com>

*Birjukova Olga*  
17 ja, historio de Rusio, bestoj  
Lesnaja 116-80,  
SEVERSK,  
Tomskaja, 636070,  
RUSLANDO

*Kolunzija Aleksandr*  
44j., ŝako, akupunkturo  
Politehničeskaja, 21-8,  
ĤABAROVSK,  
680054,  
RUSLANDO

*Centre Culturel Nantes Esperanto*  
Skribu al:  
Jesepf BARRE  
10, Rue du Senat  
F-44300,  
NANTES  
FRANCIO

*Ivačev Sergej*  
22j., korespondado, angla lingvo, matematiko  
Frunze 11-47  
RUDNY,  
Kustanajnska,  
459120,  
KAZAHIO

*E-klubo "Amikara Rondo Esperantista"*  
grupo de komercantoj petas sendi al ili salutleterojn, bildkartojn ktp  
Petofi u. 3 HU-2921  
Komaron-Szony,  
HUNGARIO

*Uspahodĵajeva Svetlana*  
26j. lingvoj angl, germ.  
Lomonosova 14-31,  
SEVERODVINSK,  
Arhangelska, 164521,  
RUSLANDO

*Aŝihina Helena*  
26 j., mineralogio,  
St.Razina 202-6,  
ORENBURG,  
460018,  
RUSLANDO

*Guy Dauphin*  
5 bis, rue Hauvy,  
10300  
Ste. Savine,  
FRANCIO

*Monogarov Pavel*  
20 j., studento, pri ĉiuj temoj  
ul.Voroŝilova, 12-920  
KEMEROVO,  
650060,  
RUSLANDO

*Jorge Angel Tarducci,*  
V.Markoni 53,  
IT 40062  
MOLINELLA BO  
C.Postale  
ITALIO

*ESPERANTO-DOMO*  
en Nepalo celas praktike uzi Eesperanton en korespondado ktp.  
P.O.Box 3447  
Kathmandu,  
NEPALO

*Dek du belegai ĝejnuloj deziras korespondi pri ĉiuj temoj*  
ab.ja.133,  
Naberejnije Ĉelni,  
Novij gorod,  
Tatarstan, 423819,  
RUSLANDO

**KORESPONDI...** listo de dezirantoj korespondi enhavas pli ol 45 adresojn. Sendu vian anoncon por senpage enpresigo; aldonu 2 Internaciajn Respondkuponojn, se vi deziras ekzempleron. Lastan eldonadon vi ricevos sendante unu IRK aŭ 10 adresojn de seriozaj esperantistaj korespondemuloj el diversaj landoj.  
R.MELO, 34, Avenue de Russie, FR.03700  
BELLERIVE S/Allier, FRANCIO

## "Oleg renkontas ĝeamikojn"

Esperantista klubo "GAJA KROKODILO" el Naberejnije Ĉelni kaj OOO "AZS" invitas ĉiujn dezirantojn partopreni E-renkontiĝon la 1-3an de majo 1998. Skribu: 423819, RUSLANDO, Naberejnije Ĉelni, Novij gorod, ab.ja.133.

